

# Komunikoj

JARO 36-a

JANUARO - FEBRUARO - MARTO

N-ro 141  
2011

“Amu vian Dion  
per via tuta animo  
kaj vian proksimulon  
kiel vin mem.”

Jesuo

Naskiĝi, morti, renaskiĝi ankoraŭ kaj ĉiam progresi tia estas la leĝo.

## KIA BELA FESTO!

La 18-an de Februaro/2011 estis tago de festo: Spiritista Grupo Regeneriĝo inaŭguris sian belan teatron kaj Eldonejo Lorenz eldonis gravegan verkon en la portugala lingvo: *O Jovem que Escolheu o Amor (La Junulo kiu Elektis la Amon)*. La aŭtorino, Maria Anita, priskribas la vivon de unu el la plej gravaj mediumoj en Brazilo, S-ro Divaldo Pereira Franco.

Preskaŭ 500 personoj ĉeestis la eventon, kiam Jorge Cerqueira prelegis pri la leĝoj de justeco, amo kaj frateco, kaj Maria Anita parolis pri sia libro, tuŝante detalojn pri la vivo de la mediumo.

Gratulon al Grupo Regeneriĝo pro la bela iniciato!



Maria Anita parolas pri sia verko.



## GRAVA KAJ IMITINDA EKZEMPLO!

Ekis en "COMEERJ-polos VIII e XVIII" (Spiritista Junulara Kunfratiĝo de la urbo Rio-de-Ĵanejro - regionaj kunordigejoj VIII kaj XVIII) unuafoja Kulto de la Evangelio en Esperanto (malferma paĝo el la libro Kristana Agendo-Spirito Andreo Ludoviko) kun preĝoj kaj komentarioj. Krome, rimarkindas la interesiĝo de la gejunuloj, la respektema silento dum la preĝoj (dulingvaj) kaj la ĉeesto de elkarniĝintoj, kiuj profitis la rektan komprenon de la laŭtvoĉe legataj tekstoj el la libro *La Evangelio laŭ Spritismo*, senbezone de "tradukaparatoj" kiuj nemalofte videbliĝas laŭ rimarkoj de mediumoj dum spiritismaj seancoj. Jesuo benu nian laboron!

Elmir dos Santos Lima.



## MEMMORTIGO KAJ ĜIAJ KONSEKVENCOJ

**Petu la libron kaj tuj vi  
ĝin ricevos, tute senpage.**

La animo ne malaperas kun la malespero de la korpo; la morto de detruas ĝin. Ĝi estas senmorta, nepereema kaj jen kial ĝi ne malaperas per memmortigo, same kiel ne ĉesas ĝia suferado, ĉar la vivo daŭras en aliaj stadio post la finiĝo de la karna envolaĵo.


Por elmontri tiun realaĵon, mi kunigis en ĉi tiun libron raportojn liveritajn de memmortigaj Spiritoj pere de pluraj medioj kaj publikigitajn en pluraj spiritismaj verkoj. Ili estas travivaĵoj pri plej malsamaj situacioj, kiujn li spertis post kiam ili detruis la fizikan korpon. Tiuj estas informoj pri pluraj regionoj de la Spirita Mondo, kie ili staĝas, portempe, elaĉetante la dolorigajn sekvojn de sia malfeliĉa ago.

Ni prezentas al vi, krome, regenerajn spertojn fare de la memmortigintoj, ĉe la reenkar-niĝo en ĉi tiu mondo, cele al la harmoniigo kun la saĝaj kaj superaj leĝoj de Dio.

Ĉio tio, vere, havas la intencon atentigi tiujn, kiuj troviĝas surtere suferante fizikajn aŭ moralajn provojn, ke ne valoras la penon mortigi sin, aŭ pli bone dirite, ke memmortigo, ili konstatas ke, male, ili daŭre vivas kaj devas elporti neesprimeblajn dolorojn kaj suferojn.

Kvankam mi reliefigas la duran realaĵon de la senlimaj suferoj kaj la afliktajn dramojn de la memmortigintoj, ĉi tiu verko havas nur al la spirita estonto kaj, tiel, ekbriligi al ili lumon de la Espero.

N.R.: La donaco de ĉi-tiu verko estas nur por eksterlandanoj; tamen, se vi, brazilanoj, havas eksterlandajn amikojn kaj deziras donaci ĝin, **PETU KAJ, KUN PLEZURO, NI ĜIN SENDOS AL VI.**



## LA LIBRO DE LA SPIRITOJ EVITAS MEMMORTIGON

“Allan Kardec (Alan’ Kardék), la Kodiginto de la Spiritisma Doktrino, en tiu malgaja mateno de Aprilo de la jaro 1860, estis laca, subprenita.

Malgraŭ la plifirmiĝo de la Spiritisma Societo de Parizo kaj la promesplena vendo de la libroj, mankis mono por la grandioza laboro, kiun la Superaj Spiritoj metis ĉe liajn manojn.

La mensa premo kreskis...

Sarkasmaj leteroj pliiĝis sur la tablo.

Kiam li estis pli malvigla, alvenis la pacienca edzino, S-ino Rivail – la afabla Gaby (Gabi) – kaj donis al li ian mendon, bone pakitan.”

Tiel la Spirito Hilário Silva, pere de la mediumo Chico Xavier en la libro “La Spirito de la Vero”, komencas la median rakonton, kiu permesas ekvidi la luktojn de Allan Kardec por la nobla misio kodigi Spiritismon.

Allan Kardec, malferninte la pakaĵon, legas leteron adresitan al li, en kiu la sendinto prezentis sian dankemon pro tio, ke li ne mortigis sin. La sendinto klarigas ke, post la elkarniĝo de la edzino, li senesperigis kaj planis sian propran mortigon en la rivero Sejno, serĉante la ponton Marie (Maĥi) por tien sin ĵeti.

“Kaj, kiam mi fiksis la manon por ĵeti min, mi tuŝis objekton iomete malsekan, kiu falis de la parapeto de la ponto ĉe miajn piedojn. Surprizite, mi vidis libron, kiun la roso malsekigis.”

Li prenis la libron kaj, iom kolere kaj scivole, legis sur la frontispicio...

“Ĉi tiu verko savis mian vivon. Legu atente kaj havu bonan profiton. – A. Laurent (Loĥan’).”

La verko estis la “Libro de la Spiritoj” kaj, en ĝi, la leter-sendinto ankoraŭ aldonis firm-litere:

“Ĝi savis ankaŭ min. Dio benu la animojn, kiuj helpis ĝian publikigon. Joseph Renier (Ĵozél’ Ĥenie).”

Post la legado de la letero, Kardec alproksimigis la libron al la brusto; li rezonis ne plu kun malespero aŭ sufero, sed kun radia espero.



## KURIOZAĴOJ EL LA LETEROJ DE ZAMENHOF



Al s-ro H. em Odessa. 1890

Via letero estas skribita tute senerare; nur la akuzativon Vi uzas ofte en okazoj kie oni tute ĝin ne bezonas. Tuŝante la akuzativon mi povas al Vi doni la jenan konsilon: uzu ĝin ĉiam nur en tiuj okazoj, kie Vi vidas ke ĝi estas efektive necesa; en ĉiuj aliaj okazoj, kie Vi ne scias, ĉu oni devas uzi la akuzativon aŭ la nominativon – uzu la nominativon. La akuzativo estas enkondukita nur el neceso, ĉar sen ĝi la senco ofte estus ne klara/ sed la uzado ĝin en okazo de senbezono pli multe malbeligas la lingvon ol la neuzado en okazo de bezono.

*L. Z.*

Pri la nova ortografio – 1890

Multaj plendas, ke la skribado per ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ kaj ŭ estas por ili neoportuna kaj malhelpas ilin ankaŭ en la presato de verketoj en iliaj lokoj, kie la presejoj ne havas la literojn kun signetoj. Ni ripetas tial tion, kio estis jam dirita en la "Aldono al la Dua Libro": anstataŭ la signeto superlitera oni povas kuraĝe uzadi la literon h kaj anstataŭ ŭ – simplan u. Por pli alkitimigi la legantojn al la nova ortografio, ni de nun ĉiam presados unu parton de la gazeto per la nova ortografio. Laŭ tiu ĉi nova ortografio ni nun ĉiam presados en la gazeto la versojn kaj la Respondojn al la amikoj.

*L. Z.*

Al s-ro S. en Kiev – 1890

Ofte Vi ripetas pri la maloportuneco de la artikolo "la". Sed la artikolo estas ja vorto tute aparta kaj sur la konstruon de la frazoj ĝi havas nenian influon; tial, se Vi volas, Vi povas tute ĝin ne uzadi, almenaŭ ĝis la tempo kiam Vi tute bone scios ĝian signifon.

*L. Z.*

LORENZ

**SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ**

Rua dos Inválidos, n. 34, grupo 903

Caixa Postal 3133 - CEP 20001-970

Rio de Janeiro (Brasil)

Tel. (21) 2221-2269 <editora\_lorenz@uol.com.br>

## ARNO PHILIPP (1870 - 1931)

*Alberto Flores*

Ĵurnalisto, tradukisto, verkisto, instruisto pri germana kaj latina lingvoj, politikisto, deputito en la provinco Rio Grande do Sul – Brazilo – de 1905 ĝis 1928 (elektita de la german-devenan loĝantoj de tiu suda regiono). Li estis instruisto ĉe "Gymnasio Júlio de Castilhos – Porto Alegre. Kiel verkisto li skribis novelojn kaj humorajn kaj folklorajn rakontojn, el kiuj elstaras la verkon, en la germana lingvo, "Drei Bagatellen (Tri Bagateloj), eldonitan en Dresden (germanujo), en la jaro 1824.



La plej granda parto de liaj verkaĵoj neniam aperis laŭ la formo de libroj: sed estas dispresita sur la paĝoj de ĵurnaloj kaj almanakoj de lia epoko.

Li naskiĝis en Zwickau, Saksonio – regiono de la orienta Germanujo – en la 11-Jan. jaro 1870. En la aĝo de 19 jaroj li alvenis en Brazilon, en la jaro 1889, kaj enradikiĝis en Rio Grande do Sul.

Tre rapide li lernis la portugalan lingvon.

Li fariĝis redaktoro de la Ĵurnalo "Deutsch Zeitung", kiu estis eldonita en germana lingvo, en Porto Alegre, ĉefurbo de Rio Grande do Sul. Kompetenta homo, multajn bonegajn servojn li faris al la kulturo.

Arno Philip estis unu el la pioniroj de la lingvo Esperanto en la suda provinco Rio Grande do Sul.

Li estis 24 jara kiam, kiel redaktoro de la Ĵurnalo "Deutsch Zeitung" li publikigis, en la jaro 1894 (7 jaroj post la apero de Esperanto en Eŭropo, en 1887) bonan artikolon tre favoran al la lingvo helpa internacia Esperanto, kaj antaŭdiris ĝian brilan estontan sukceson!

Li aliĝis al la Esperanto-Movado en la jaro 1895. Lia nomo aperas kiel numeron 3846 en la XVII ADRESARO eldonita de D-ro Lazaro Ludoviko Zamenhof kun la nomaro de la esperantistoj kiuj skribis de oktobro de 1895 ĝis januaro de 1897. Lia adreso – urbo Porto Alegre – Rio Grande do Sul – estas la unua brazila loko aperinta en la ADRESARO

Post, en 1897, aperis kiel adeptoj de Esperanto en Rio Grande do Sul: Francisco Valdomiro Lorenz, A. Riegl kaj T. da Silva, de la kolonio S. Feliciano – Rio Grande do Sul; kaj Christiano Kraemer, Reynaldo Frederico Geyer kaj Arno Ernest, en Porto Alegre – R. G. Sul.

En la XV ADRESARO – 1897 – aperas kiel numeron 4,278, la nomo de Felix Bernard Zdanowski, de Porto Alegre – R. G. Sul, Brazilo.

Arno Philip publikigis en germana lingvo, por la german-devenaj kolonistoj en Brazilo, kelkajn verkojn de brazilaj verkistoj.

En la jaro 1925 li tradukis germanen la 3 volumojn. De "As Minas de Prata" de la fama brazila verkisto José de Alencar. La libroj estis eldonitaj de "Librejo Rotermund" – S. Leopoldo – R. G. do Sul – kun antaŭparolo, en la portugala lingvo, de Mario de Alencar (verkisto kaj ĵurnalisto, filo de José de Alencar).

Arno Philipp ankaŭ tradukis germanen la verkojn: "O Guarani", "O Tronco de Ipê", "Viuvinha" kaj "Cinco Minutos", de José de Alencar, kiu estis lia amiko.

Al la germana lingvo Arno Philipp tradukis ankaŭ romanon "Inocência" – de la brazila Vic-grafo (Visconde) de Taunay (Alfredo Maria Adriano d'Escragnolle Taunay).

Arno Philipp estis pionira apoganto kaj amiko de Esperanto.

Li mortis en la urbo Porto Alegre – Rio Grande do Sul – Brazilo – la 31-an de Oktobro en la jaro 1931. Li estis tiam 61 jaroj aĝa.

## ELDONEJO LORENZ, 35 JAROJ DE FRUKTDONA SEMADO




Konsilantoj kaj amikoj de nia Eldonejo ĉeestis la memorindan datrevenon. Koran dankon al ĉiuj!

## Lançamento



LORENZ



Diversas Mocidades do Estado do Rio de Janeiro questionam sobre os mais diversos temas e 25 escritores espíritas respondem. Raul Teixeira, Richard Simonetti, André Trigueiro, Cesar Reis, Orson Peter Carrara, Sergio Filipe, José Carlos Leal, Izura Hart, Milton Menezes, Darcy Neves, Marcel Mariano, Nadja do Couto Vale, Plínio Oliveira, José Passini, Carlos Augusto Abranches, Cristian Macedo, Dalva da Silva Souza, Ney Lobo e outros expoentes do Movimento Espírita compõem este belo time de escritores. O livro contém 296 páginas, sendo que 8 são coloridas com as fotos das Mocidades que participaram do livro.

Outro destaque é que cada escritor apresenta uma foto sua quando jovem e uma atual.

O tamanho é 15,5 x 23 cm.

Preço especial de lançamento: R\$ 28,00

Pedidos: [editora\\_lorenz@uol.com.br](mailto:editora_lorenz@uol.com.br)

(21) 2221-2269



Renato kaj Galindo, du gravaj amikoj de nia Eldonejo dum la Universala Kongreso en Kubo (2010).

**Eldonejo Lorenz vin dankas  
pro la konstanta apogo!**

### LA TROMPIĜO DE L' SINMORTIGINTOJ

Bedaŭrinda estas tiu homanimo,  
kiu la fadenon de la terekzisto  
tranĉis propravole, ĉu pro malpersisto  
en sufero, ĉu pro falsa hont' aŭ timo.

Respektinda estas l' intermonda limo,  
kiun gardas ja la mortanĝel-pordisto,  
obeanta la ordonojn nur de Kristo;  
propravole ĝin transiri estas krimo.

Trompas sin l' animo, kiu malpermesas:  
el la korp' fuĝante, ĝi sin mem liveras  
al daŭrigo de la suferad' amara,

kiun ĝi elteni sur la ter' ne volis;  
ĝia ago la fatpezon ne abolis,  
prokrastiĝis nur la pago sort-ripara.

Spirito: Cruz e Souza

Mediumo: F. V. Lorenz / Eldonejo: FEB